Naturally, until good military speakers are produced, good teachers would have to be actively on hand. Esperanto is spoken across the world. Many make errors while still learning, many are influenced by their native language, yet Esperanto is the same language as in 1887, although new words have come into general use (not invented, or indeed approved, by the Academy), expressions and style have changed. Youth culture has many slang expressions. No one polices them. Many such expressions will die, others may come into general use.

Any language would have to be taught and used to the highest possible standards. No doubt officers would lead the way. What would have to be avoided is Esperanto becoming some sort of isolated jargon within a section of the armed forces

(which is not to say that sections of the military should not have their own technical language, slang, etc., any of which may well not be fully understood outside their particular ranks). Such would evolve. Any language alters if it is isolated from other speakers, i.e. a Glaswegian and a Jamaican may well find it difficult to communicate in English unless they have a good knowledge of a more general sort of English.

It is no matter if new words and expressions, slang or jargon, are created, but communication needs to be maintained with the wider world of speakers. This probably would need to be a part of any serious policy, as Esperanto would not form the natural environment 'on the streets'. Not 'policing' inside, but communication outside is required.

Geoffrey Sutton



Amaskomunikiloj gurdis

Estimataj,

Kvankam, jam de 2001, iniciate de la Eŭropa Konsilio, la 26a de septembro estas celebrata kiel Eŭropa Tago de la Lingvoj (plurale) <http://www.ecml.at/edl/default.asp>, amasinformatoj gurdas, unu monaton antaŭe, ke la francoj estas malbonaj en la angla kompare al la civitanoj de landoj tiaj, kiaj Svedio, Nederlando aŭ Germanio.

Informo esenca por pli bona kompreno de la problemo estas prisilentata. La lingvo parolata en ĉiu el la ĉi-supre menciitaj landoj apartenas al la ĝermana familio, dum la franca estas latinida. Se la itala ludus hodiaŭ la rolon de la angla, la franclingvanoj estus inter la plej bonaj.

Rimarkinda verko de Georges Kersaudy, *Langues sans frontières* (eld. Autrement, Parizo), prezentas 39 lingvojn de Eŭropo kun kompar-tabeloj de la vortrezoro de ĉiu el ili, inkluzive de Esperanto. La aŭtoro, kiu lernis Esperanton kiel unuan fremdan lingvon jam adoleske, lernis poste kvindek de Eŭropo kaj Azio, kiujn li parolis, skribis kaj tradukis tra la mondo kiel internacia funkciulo.

Sed, plej grave, oni ne levas demandojn pri la angla, dum verko aperis ĉi somere sub la subskribo de iama laboranto ĉe British Council, profesoro Robert Phillipson: *Linguistic Imperialism Continued* (Londono: Routledge: www.routledgelinguistics.com; ISBN 978-0-41587201-0). Ĝuste tie devas komenciĝi la pritraktado de la problemo.

La asocio Espéranto-Vendée rememorigas pri la ekzisto de iniciato favore al la lingvoj, tiom pli interesa, ke ĝi aperis precize en Anglio: "Springboard... to languages" (www.springboard2languages.org).

Henri Masson, Francio



Nova afiŝo 'Privilegio'

Karaj amikoj,

Mi kunmetis la parolantojn de la 23 oficialaj EUaj lingvoj sur afiŝon.

Dudek du el ili lernas la lingvon de la 23a (eble la 1a?), kiu intertempe ripozante ĝuas privilegion, monon, prestiĝon.

La teksto en tiu unua versio estas en Esperanto. Kiel ĉiam la afiŝo povas esti libere kopiata kaj uzata por la bonaj celoj de nia lingvo.

Mi volonte ŝanĝos la tekston en nacian lingvan, se oni sendos al mi la tradukon en la formato UTF8.

Leo De Cooman, Belgio <Leo.De.Cooman@pandora.be>

EAB bookshop – selection

• Please add 15% for postage and packing. Cheques payable to 'EAB'. You may make telephone purchases using your debit card: tel. 0845 230 1887. • EAB cannot stock all titles, but can order items, for which you pay EAB in sterling. The UEA Catalogue is at: <http://katalogo.uea.org>.

• Second-hand books are available from librarian Geoffrey King: www.biblbut.org/html/brokante.



Dr Esperanto's International Language L.L. Zamenhof £3.90
Berwick: Verkista, 2007. 48p., PB. The 'first book', in which Zamenhof presented Esperanto and its grammar to the world, translated into English by Richard H. Geoghegan; this 2007 edition has a modern preface by G. Keys.

Esperanto de nivelo al nivelo *NEW* M. Kovács £8.99
Budapest: ELTE-IEK, 2008. 136p., 24cm. Support material to help prepare for exams in the Common European Reference Framework (Komuna Eŭropa Referenckadro).


Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof *NEW*
A. Korjenkov £19.00. Kaliningrad: Sezonoj/Litova Eo-Asocio, 2009. 320p. Vol. 8 in the series 'Scio'. A biography of Zamenhof, including details not revealed in previous biographies.

Ilustrita oficiala radikaro Esperanta por lernanto *NEW*
Luiz Portella £5.00. Brazil: Pentuvio, 2008. 98p., 15cm. An illustrated dictionary (for beginners) listing 2,656 basic words, with approximately 520 illustrations.

Kun diablo en la korpo Raymond Radiguet £9.05
New York: 2006. 139p., 22cm. The semi-autobiographical love story between a schoolboy and a young married woman, set in Paris in 1918. Translated from the French by Michel Duc Goninaz.

Maigret eraras *NEW* Georges Simenon. Transl. by D. Luez. £10.40
Kaliningrad: Sezonoj, 2009. 128p., 20cm. Maigret investigates the murder of a young woman living well beyond her means in a luxury apartment with a saxophone player.

Mia vojo, kolorigebla libro *NEW* Leda Violeta Coronado C. £5.00
Cartago: 2002. 20p., 28cm, illustrated. A colouring book about the journey of a water-droplet. Translated by Guido Hernández M.



Morto de artisto *NEW* Anna Löwenstein £17.70
Antwerp: FEL, 2008. 619p., 21cm. A historical novel about the friendship between a young slave and the future emperor Nero.

Nanatasis Robert Dutil £8.60
Montreal: Eo-Societo Kebekia, 2005. 112p., 18cm, illus. A charming tale about a canoeist in the Canadian north who is rescued by a native girl with extraordinary abilities. Translated by E. Brent, illustrations by Martine Saura.

Serpentoj en la puto *NEW* István Nemere £15.50
Kaliningrad: Sezonoj, 2009. 184p. In a west-European city, fanatical Islamic terrorists struggle against equally fanatical police.

Tradiciaj rakontoj (CD & book) £5.90
Beauville: SAT, 2003. 47p., 21cm. Fifty very short stories with a CD recording from a French group. Suitable for beginners and intermediate students.

Traduku! William Auld £7.00
Barlaston: EAB, 2004. 116p., 21cm. Fifty-six translation tasks, with extensive comments and model translation. An index of relevant words and discussion points is included. An excellent book to hone translation skills.

What They Don't Often Tell You *NEW* Nicole Else £5.90
Sydney: AEA, 2009. 35p., 30cm, illus. A book about languages, aimed towards children and young adults. Illus. by L. Giloteaux. (Previous editions were titled *Mummy, Why Can't We All Speak the Same Language?*).



El Felixstowe, tra Liberec, al Bjalistoko

www.jeb.org.uk

La somera renkontiĝo de JEB Lokazis dum la 4a kaj 5a de julio en la bela urbo Felixstowe. Entute ok gejunuloj ĉeestis kaj ĝuis interesan semajnfino ĉe la marbordo. Ni alvenis sabaton posttagmeze, kelkaj el ni post tre longaj vojaĝoj, kaj renkontiĝis ĉe la domo de la familio Tellier, kie Angela kaj Dominique tre ĝentile bonvenigis nin, malgraŭ tio, ke Tim donis al ili nur dudek sekundojn da averto, ke JEB estas en ilia hejmurbo.

Post iom da diskutado pri la plej interesaj novaĵoj en Esperantujo, ni vespermanĝis ĉe loka trinkejo kaj, kvankam jam mallumiĝis, iomete promenis laŭ la strando. Ni aparte ĝojis pro la ĉesto de Willow, lernantino de Esperanto, kiu pasintjare ĉeestis Course-You-Can en Barlastono, kaj daŭre bone progresas.

Dimanĉon ni volis esplori la urbon, kaj Angela konsilis al ni viziti Fuorton Landguard, antikva fortikaĵo, kiu troviĝas ekster la urbo mem. Tie ni pasigis kelkajn interesajn horojn kaj multe lernis pri la historio de la regiono kaj de Britio pli ĝenerale.

IJK en Ĉeĥio

Inter la 18a kaj 25a de julio okazis la Internacia Junulara Kongreso, ĉi-foje en Liberec, Ĉeĥio. Naŭ britoj partoprenis la eventon, kelkaj dank' al la NoJEF-fonduso. Kiel kutime, Rolf faris gravan kontribuon al la organizado de la semajno, kaj kune kun Tina el Kroatio li respondecis pri la vespera kaj nokta programoj. Iun vesperon li organizis amuzan kvizon, por kiu li prenis ideojn el famaj britaj kvizoj kiel 'Just a Minute'. Unu el la partoprenantoj estis JEB-prezidanto Tim Owen, kiu

pro lerta karaokeo gajnis multajn poentojn.

Kvankam la plej aĝa brita partoprenanto, Tim Morley bone sukcesis konduki kiel junulo dum la tuta semajno, kaj eĉ dufoje prelegis. Unu sesio lia temis pri la projekto 'Springboard to Languages', kaj la internacia aŭskultantaro montris multe da intereso kaj admiro pri la sukcesoj, kiujn li priskribis. Ankaŭ la plej juna JEBano, Jake Pentland, por kiu la IJK estis lia unua Esperanto-renkontiĝo, ege ĝuis la sperton kaj jam verkis interesan raporton, kiun vi povas legi en la JEB-retpaĝaro. Se li ne antaŭe informintus nin, ni certe ne divenintus, ke li neniam antaŭe parolis Esperanton kun veraj esperantistoj!

Polaj kul-atakoj

Post la IJK, kvin el ni pluveturis al la Universala Kongreso (UK) en Bjalistoko. Ankaŭ tie Rolf laboris, kaj gvidis plurajn sesiojn de aktivula trejnado, kiujn ĉeestis la ĉeforganizanto de la venontjara IJK en Kubo kaj la TEJO-respondeculo pri kongresoj. Ne ĉiuj el ni ĝuis la UK-on tiel multe kiel la IJK-on, aparte pro la teruraj kuloj, kiuj atakis Clare kaj Tim dum la dua vespero!

Londona renkontiĝo planata

Post plenplena somero, la plimulto de ni nun denove hejmas kaj pripensas nian aŭtunan agadon. Gavan kaj Tim laboras kune kun Helen Fantom por organizi la EAB-budon ĉe la Londona Lingva Foiro. Clare starigis konton por EAB ĉe Twitter, kaj klopodas regule publikigi legindajn novaĵojn ĉe www.twitter.com/Esperanto_UK. Kaj kompreneble ni ĉiuj pri-



Tim kaj Mikeo sur la strando dum la JEB-renkontiĝo en Felixstowe

diskutas la venontan JEB-renkontiĝon, kiu okazos en Londono en septembro aŭ oktobro. Se vi interesiĝas kaj ŝatus partopreni, bonvolu kontakti nin en la JEB-forumoj! □



Clare Hunter apud la Zamenhof-monumento en Bjalistoko, Pollando

- **Linguistic Imperialism Continued**

This new work by Prof. Robert Phillipson was published on 1 July, a continuation of his book *Linguistic Imperialism* (by the same publisher Routledge, London, 1992).

- **Considerable media success**

There has been some considerable success in several British mass media lately. Several members deserve much praise for this.

A press release by UEA was sent by Esperanto Lobby to 844 media contacts, in Esperanto Lobby's name. A few succeeded, namely a full-page in *The Times* (date unknown) – it is also reported that a correspondent of *The Times* was present at the World Congress in Białystok.

Fifteen column inches appeared in *The Daily Mail* on 28 July. Partly humorous, but essentially positive, it was entitled 'Esperanto, the lingo [sic] of lovers', although with attempted phrases hacked about and misspelt.

There was an interview with Stephen Thompson on BBC News 24, Manchester, at 19.40 on 27 July. Deutsche Welle also reported.

An objective article, entitled "Esperanto Celebrates Power of Hope" – on the BBC website at http://news.bbc.co.uk/2/hi/middle_east/8159082.stm – was written by Dina Newman, whose

experiences in Israel have reignited her enthusiasm for Esperanto.

On 11 August, Hilary Chapman was interviewed about Esperanto on BBC Radio Stoke, and Tim Morley on BBC Radio Cambridge on the same morning.

On 21 August, Clare Hunter appeared on BBC Radio West Midlands.

- **Honoro al Nobel-premiito**

Antaŭ nelonge la Fakultato pri Ekonomio de Universitato de Göttingen, Germanio, distingis profesoron Reinhard Selten, Nobel-premiiton (*bildo sube*), per honordoktora titolo. En la laŭdado prof-ino Claudia Keser (kiu iam eklernis Esperanton), diris kelkajn frazojn en bonkvalita Esperanto al la aŭskultantaro. Partoprenis multaj eminentaj profesoroj el Germanio kaj eksterlando. Dum la festo oni kelkfoje menciis Esperanton. Sian fakprelegon prof. Selten mem komencis en la internacia lingvo.

- **Birmingham Mail**

A piece appeared in the *Birmingham Mail* entitled 'Wedding bells chime for couple brought together by Esperanto language', featuring Clare Hunter and Tim Owen.

- **Raportajo en 'viva Esperanto'**

Ĉe germana televidkanalo La 22an de julio 2009 en sia

noktomeza programo *Nachtmagazin*, la unua germana televidkanalo ARD elsendis tri-minutan raporton pri la 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, kiu okazis fine de julio en Liberec, Ĉeĥio. Laŭ statistikoj de ARD vidis tiun raporton ĉirkaŭ 560 000 spektantoj.

La raporto elstaras ne nur pro tio, ke preparis ĝin la eksterlanda redakcio de ARD en Ĉeĥio, sed ankaŭ pro la fakto, ke ĝi estas preskaŭ komplete parolata en Esperanto, kun subtekstoj en la germana. Per tiu escepta sin dediĉo, la redaktoro Danko Handrick, helpita de kongresanoj Carsten Mischke kaj Gregor Hinker, celis montri al la spektantoj 'vivan Esperanton' – kio estas ankaŭ la nomo de tiu raporto.

La raporto spekteblas ĉe: www.youtube.com/watch?v=rwqJITm5xrM.

La IJK meritis atenton ankaŭ pro la trilanda kunlaboro inter ĉeĥa, germana kaj pola junularoj esperantistaj.

- **MemoQ incorporates Esperanto functionality**

The Computer Assisted Translation (CAT) tool MemoQ, created by Hungarian company Kilgray, now includes Esperanto functionality as standard, following requests from translators. Professional translators have used CAT tools (Trados, DejaVu, Wordfast) for some years to help them provide consistent and high-quality translations. MemoQ has become increasingly popular with professional translators over the past 18 months and has become well-known for its excellent support services. The willingness with which they have included Esperanto is evidence of their readiness to work hand-in-hand with translators/linguists.

The Esperanto functionality makes it possible to store projects with Esperanto as source



Maldekstre: La fakprelego de Nobel-premiito pri Ekonomiko prof. Reinhard Selten en Universitato de Göttingen, Germanio. Dekstre: Prof. Selten

or target language and compile term bases and translation memories using combinations of Esperanto and any other supported language. The software will be particularly useful for professional translators using Esperanto, but will be equally helpful to anyone undertaking large quantities of translation work.

• **Lord Robert Cecil kiel subtenanto de Esperanto**

Kelkaj homoj lastatempe esploris pri la rilatoj de Lord Robert Cecil kun Esperanto. Li ne scipovis Esperanton sed ĝin subtenis. Pri lia subteno ĉe Ligo de Nacioj oni povas legi en *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins, p. 66 (unua eldono, 1988): "Lord Robert Cecil, amiko de Esperanto, admonis la Komisionon "memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem." Piednoto indikas la fonton: *Esperanto* n-ro 18, 1922, p. 166. Geoffrey King kaj John Wells elserĉis du menciojn en *The British Esperantist* de 1921 (paĝoj 28 kaj 76-7). John aldonis ke, mallonge dirite, la lordo "antaŭe supozis, ke Esperanto estas ŝerco; sed nun li inkliniĝas opinii, ke li eraris. Li estus tre kontenta vidi Esperanton en Eŭropo... Tia universala lingvo tre materie helpus la utilecon de la Ligo de Nacioj". La koncerna paĝo ĉe Vikipedio http://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Cecil estas ĝustigenda.

• **"Esperanto estu la oficiala lingvo de Eŭropo"**

Marc Rousset, la aŭtoro de la franclingva libro *La Nouvelle Europe – Paris-Berlin-Moscou?* (La nova Eŭropo – Parizo-Berlino-Moskvo?), iama ĝenerala direktoro de societoj Aventis, Carrefour kaj Veolia, proponas fari el Esperanto la oficialan lingvon de Eŭropo, por "sin liberigi el la angla-usona, kiu konkuros al malaperigo de ĉiuj niaj lingvoj".

Tion li diris ĉe 'Yvelines Radio' (www.yvelinesradio.com/infos_all/affichage_all_01_489716576612_681).

Eblas aŭdi lin ĉe Dailymotion (www.dailymotion.com/user/LeGrandLuernios/video/x9mtxp_laxe-parisberlinmoscou-44_news?hzmz=707265766e657874).

• **"Unueco en diverseco" (devizo de EU) en la praktiko**

Eŭropo sen aliaj lingvoj ol la angla, tio estas la mistifikaĵo, kiun oni preparas en Bruselo: tiu retejo www.buildup.eu, sub la eŭropa flago, proponas jenan "elektelecon" de lingvo(j): English. Por reagi, por klare, vige kaj firme sciigi, ke tian Eŭropon, oni tute ne volas: <privacy@buildup.eu>. Ne necesas multaj frazoj kaj vortoj.

• **Esperanto House as landmark**

A piece entitled 'A good walk. Barlaston, Staffordshire' appeared in *The Times* last April. It mentions Esperanto in the description of the walk, as well as featuring a map of the village with Esperanto House clearly indicated (see www.timesonline.co.uk/tol/travel/destinations/england/article6072863.ece).

• **E-petition to 10 Downing St.**

Brian Barker organised an e-mail petition to 10 Downing Street to ensure that the British Ambassador attend the World Esperanto Conference in Białystok, Poland. It was sent out to some 80 British Esperantists. The majority of signatures nevertheless seem to have come from non-Esperanto-speakers. These included Euro-MP Nigel Farage (Leader of UKIP in the European Parliament) and Dave Wetzel (Deputy to London Mayor Ken Livingstone for tfl in the London Assembly). David Drew (Labour, Stroud) wrote to the Prime Minister. Jeremy Corbyn (Labour, Islington North) placed a Parliamentary Question to the Prime Minister.



• **Elstara Zamenhof-medalo**

La fama germana artisto Peter Götz Güttler kreis por Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH) eksterordinaran Zamenhof-medalon okaze de la Zamenhof-jaro.

Oni asertas, ke eble temas pri la plej elstara Zamenhof-medalo en la historio de la Esperanto-movado. La medalon oni jam uzis por honorigi la urbestron de Herzberg, Gerhard Walter, pro la sukcesa lobiado por 'Herzberg – la Esperanto-urbo' kaj d-ron Rudolf Fischer, kiu estas prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, pro la kelkjardeka aktiva kaj sukcesa agado.

Du versioj de la medalo estas aĉetebaj de ICH, Grubenhagenstr. 6, D-37412 Herzberg/Harz, la Esperanto-urbo. Tel. +49 (0)5521-5983; www.hertzberg.de; <http://ic-hertzberg.de>.



No British diplomat turned up – well, there’s a surprise then!

• **Pri la edukado en Kubo kaj Cseh-seminario en Hago**

La 17an de oktobro 2009 okazos kunveno ĉe IEI en Hago, kiam la ambasadorino de Kubo kaj respondeculo pri Edukaj Aferoj parolos pri la edukada sistemo en Kubo. Plie, Ana Montesinos de Gomis, konata esperantistino el Britio, prezentos ludojn kaj ludilojn por lerni pri Esperanto-kulturo. Lasta programero estos telekonferenco kun reprezentanto de ĝemela ILEI-Sekcio en Kubo kaj ILEI-Estrarano Julián Hernández Angulo. Li parolos pri la stato de la instruado en la lando de venontjaraj eventoj, kiaj estas UK, IJK kaj ILEI-Konferenco. La programo estos kompletigita per la kutima ero ‘Lingvaj demandoj’, gvidata de Rob Moerbeek. Estas rekomendinde sin anonci al la retadreso de la sekretario: iesperanto@versatel.nl.

“Zamenhof kreis la lingvon kaj Cseh la metodon por instrui ĝin”, oni kutime diras en Esperantujo. Jen, do, ŝanco konatiĝi kun la fama metodo iniciatita de Andreo Cseh (‘Ĉe’). La seminario okazos inter la 6a kaj 8a de novembro 2009, kaj ĝi estas destinita al instruistoj de Esperanto, kiuj volas studi la metodon kaj trejniĝi en la plej aktualaj teknikoj de rektmetoda lingvo-instruado. La seminario-vidanto estos Atilio Orellana Rojas. La instruado okazos en la Andreo Cseh-Domo, sidejo de Internacia Esperanto-Instituto (Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. +31 70 3556677). Gejunuloj ĝis 30-jaraj ĝuas 50%an rabaton. La kotizo pageblas surloke, sed necesas frue aliĝi. IEI (www.iei.nl) helpas trovi tranoktejon.

• **Profesia aplikado**

Raporto pri ‘Profesia aplikado de Esperanto’ aperas ĉe www.

ipernity.com/blog/32119/181612, momente nur en Esperanto. Franca traduko baldaŭ aldoniĝos.

• **Vandalo atakis monumenton de Zamenhof dum UK**

Ĵaŭdon vespere vandaloj atakis la monumenton de Zamenhof en la centro de Bjalistoko, kie estis okazanta la Universala Kongreso de Esperanto. La antaŭan nokton iu ĵetis botelon da brullikvaĵo en la direkton de la nova Zamenhof-Centro, rakontas loka gazeto. La ŝtona domo ne ekbrulis. La okazintaĵoj malkovris gardisto matene.

La incidento ĉe la busto de Zamenhof okazis post la 19a horo. Laŭ atestanto, junulo eble 18-jara, en kapuĉo, prenis el sia sako ion, verŝis farbon sur la vizaĝon de Zamenhof, kaj rapide forkuris. Neniu ĉeestanto havis tempon interveni.

La loka gazeto *Kurier Poranny* (www.poranny.pl/apps/pbcs.dll/article?AID=/20090731/BIALYSTOK/8798577 61) supozis, ke temas pri rasisma atako, kredeble pro la juda deveno de Ludoviko Zamenhof, aŭ povus esti ‘simpla’ fremdul-fobio. La repaĝo de la gazeto rakontas, ke jam antaŭ la kongreso iu ekbruligis la ‘tendon Zamenhof’ ĉe la kongresejo, kaj ke nekonatoj tranĉis la pneŭmatikojn de aŭtobuso de esperantistoj. La gazeto rakontas ankaŭ pri la atako kontraŭ la amasloĝejo de junaj kongresanoj, okazinta nokte inter lundo kaj mardo.

Plej amare estas tio, ke pri ĉiuj el ĉi tiuj faroj kulpis urbano de Bjalistoko. Tiel bjalistokanoj adiaŭas la esperantistojn, diras la vicurbestro Aleksander Sosna, kiu alvenis al la busto de Zamenhof baldaŭ post la atako.

(Informoj el *Libera Folio*, www.liberafolio.org.)

• **Discuss machine translation**

In an article in the *Independent Life* supplement on 23 Septem-

ber, an article on machine translation via the internet added “join the discussions on the blog at www.independent.co.uk/cyberclinic “ ... and “e-mail any technology gripes to cyberclinic@independent.co.uk”.

• **Ĉina Radio Internacia invitas partopreni honore al la 150-jariĝo de Zamenhof**

Okaze de la 150-jariĝo de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof, la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia invitas partopreni en la agado prezenti bukedon kaj doni opiniojn kaj komentojn sur sia retejo: <http://esperanto.cri.cn/94uk/bondeziro>. Ili redaktos kaj publikigos viajn komentojn en sia retejo, ankaŭ voĉlegos ilin en la radio. Ili petas pri baldaŭa agado.

• **Australian initiative in primary schools**

Here is some information on documents concerning an Australian initiative to teach Esperanto in primary schools: “Australian LOTE – Achieving Broad and Deep Competence in Language at School”; <http://thebegavalley.org.au/16441.html>; The World of Primary Esperanto.ppt. Downloadable documents: <http://drop.io/mondetoamikaro>; (EN) The World of Primary Esperanto.ppt (9 Mb); (EO) La Mondo de Bazlerneja Esperanto.ppt (9Mb); <http://thebegavalley.org.au/16441.html>; *Mondeto – A Second Language for All Children*.

• **“Malkovru Esperanton”**

Tio estas la titolo de belaspekta kaj riĉenhava broŝuro 24-paĝa, kiun kunlabore eldonis E@I <<http://ikso.net/eo/>> kun ILEI <<http://ilei.info/>>. Se vi jam malkovris Esperanton, nu, malkovru nun tiun elŝuteblan broŝuron por ĝin malkovrigi ankaŭ al aliaj per nacilingvaj tradukoj. Laŭdire, vere belega laboro, kiun ebligis la interreto!



• Kiel ligiĝas mondfama meteorito kaj Esperanto?

La 26an de majo 1751 falis teren granda meteorito apud la vilaĝo Hraščina-Trgovišće en nuna norda Kroatio. Tiel brilega estis la alteriĝo, ke ĝi videblis eĉ en Graz kaj Bratislavo. Mondfamas la meteorito, ĉar ĝi estas la unua, kiu estas science dokumentita; ĝin oni ekspozicias en Zagreba muzeo. Kaj, antaŭ nelonge, la aŭtoritatoj decidis starigi tabulon (*supre kaj dekstre*) ĉe la alteriĝejo. Ili proprainiciate petis, ke la pompa tabulo estu ankaŭ plene



en Esperanto – sed tio tamen ne venis el la ĉielo! Ili konsciiĝis pri la graveco de Esperanto por sia distrikto per la ĉiujara Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj, organizata en la bieno Njeguš de Spomenka Štimec. Ĉi-jare la temo ĉirkaŭis *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, kompilitan de Geoffrey Sutton, kiu tie prezentis la libron, kun sia flugo pagita de la Kroatia Ministerio por Kulturo.

Por senpaga elŝuto iru al: <http://ikso.net/brosuro/provo/MalkovruEsperanton.pdf>. Por pli da detaloj: www.liberafolio.org/2009/multlingva-brosuro-proponas-malkovri-esperanton.

• **Kontribui al Zamenhof-monumento en Herzberg**
Se vi deziras kontribui al la projektata Zamenhof-monumento en Herzberg – 0,85-metrojn alta busto de Zamenhof el blanka marmoro, prenu kontakton kiel eble plej baldaŭ, ĉar la urbo inaŭguro ĝin la 15an de decembro. Por subteni la iniciaton, oni povas aĉeti 'Zamenhof-brikon' je la valoro de 50 eŭroj per ĝiro al la bankkonto (je la asocia nomo: Esperanto-Gesellschaft Südharz

en 37412 Herzberg; konton-ro: 101457927, bankindikilo (BLZ): 26351015) aŭ per IBAN: DE28263510150101457927 BIC: NOLADE21HZB. Bedaŭrinde oni ne indikas UEA-konton, sed tio eventuale estas eltrovebla (Interkultura Centro Herzberg, D-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983; rete: esperanto-zentrum@web.de; www.herzberg.de; <http://ic-herzberg.de>).

Dum la Bjalistoka UK oni montris novan filmon pri la Esperanto-urbo.

• **Sadiq Khan MP**
Sadiq Khan estas la parlamentano por Tooting, suda Londono. Li estis unu el la naŭ britaj parlamentanoj, kiuj subtenis

Esperanton por la Pac-premio Nobel. Antaŭ nelonge li fariĝis ano de la t.n. Privata Konsilio brita, informis Gregory Porilo. □

New members of EAB

D.G. Dickinson, Penrith
Ken Dyke, Nottingham
C. Hughes, Tewkesbury
A. Rockett, Durham
Carolyn Wade, West Yorkshire

Completed the Free Postal Course

Marion Whistle, London

Examination success

Miland Joshi, Birmingham (Advanced) – with merit.
Tom Rothwell, Marlborough (Elementary) – with distinction.


Utopio infera?

Forever Pleasure by Theodore R. Eastman. Bloomington, IN: iUniverse, 2008. 232 pp. ISBN 978-0-595-49909-0. ± £10.18.

Kial recenzi anglalingvan romanon en *EAB Update*? Ĉar Esperanto estas kerna elemento de ĝia etoso.

Forever Pleasure estas sciencfikcia romano verkita de inĝeniero, kiu laboras por NASA kaj JPL (Laboratorio por Jetpelado). Du fojojn la ĉefprotagonisto vojaĝas en futurojn, kie la homaro pli kaj pli malsimilas al niaj konceptoj de homeco. En la pli proksima futuro, racio forpelas emociojn, hiperintelligentaj robotoj administras la ekonomion, ĉiu ricevas aŭtomate la esencajn rimedojn por komforta vivo, kaj oni laboras nur por havi luksaĵojn. Oni konstruas homajn personecojn por forigi trajtojn nedeziratajn de la socio. Por lerni lingvojn necesas nur medicina operacio, kiu kreas tujajn spertulojn. (Paradiza solvo por eternaj komencantoj?)

En la pli malproksima futuro, la limoj inter homoj kaj arte-



faritaj estaĵoj ne plu ekzistas. Ĉiu homo estas modifita, kaj povas plu ŝanĝi sin dum palpebrumo. Neniu laboras. La vivo estas vojo de porĉiama plezuro. La sola minaco estas Jeso, kiu celas devige ŝanĝi ĉiujn en estaĵojn, kiuj similus malpli al libervoluloj ol al maŝinoj, kiuj ja spertus plezurojn, sed kiuj ne kapablus elekti sian sorton.

La aŭtoro havis okazon esplori gravajn temojn, kiel la rolon de libervolo en utopia socio, kaj ĉu senĉesa plezuro vere estas dezirinda celo por la homaro. Theodore Eastman iomete traktas tiajn temojn, sed nur tre malprofunde. Anstataŭe, plimulto de la romano priskribas 'plezurojn', kiuj, almenaŭ por la recenzanto, tudas kaj bagatelas – iom kiel la plezuroj proponataj de Mefistofelo en la teatraĵo *Dr Faustus* de Christopher Marlowe. Por mi, tia futuro estus infero, ne utopio.


Ankaŭ la intrigo de la romano bagatelas, kaj la karakterizado nesubtilas. Aldone, por mi, energia uzado de usona slango ĝenas.

Por ni esperantistoj, eble la plej interesa flanko de la romano estas la rolo de Esperanto. Post decido de la Eŭropa Komunumo uzi Esperanton kiel internan lingvon, Esperanto iĝas unue la dua lingvo de la tuta mondo, kaj poste la unua de la interna sunsistemo. Estas bone legi anglalingvan romanon, kie verkisto serioze traktas Esperanton, kaj homoj uzas ĝin por ĉiutagaj aferoj. Theodore Eastman eĉ iomete donas elementan lecionon pri la lingvo: li intersternas mallongajn ne-tradukitajn Esperantajn frazojn, kies signifo evidentas pro la kunteksto. Tamen tion difektas tro da preskoboldoj, foje ridigaj (ekzemple *dame* anstataŭ *damne*). Kaj ĉu ja verŝajnas, ke Esperanto ne evoluos dum la venontaj jarmiloj?

Michael Cayley

On invented languages

In the Land of Invented Languages by Arika Okrent. New York: Spiegel & Grau, 2009. 352 pp. Hardcover. ISBN 978-0-385-52788-0. ± £13.00.



This is a recently published book from the States, which explores the world of 'created languages' from the point of view of an outsider. The author, Arika Okrent, is herself a linguist (PhD, Chicago) but the book is written for a general readership. She looks at early efforts (Dalgarno, Wilkins et al.), Esperanto in some detail (Volapük, Ido and Interlingua in passing), Charles Bliss's symbol-language (and some others – fascinating), Loglan/Lojban ('logic-languages' – phew!), Klingon and the world of Conlang (DIY languages, hundreds of them, on the internet!), in a sympathetic, leg-pulling but truly informed way.

Esperanto comes out of the comparison very well indeed – as it always does when a linguist takes the trouble to actually learn something about the language! I can recommend it: good Christmas present for someone? A full review will appear in *La Brita Esperantisto*.

David Kelso

Denove Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio invitas al Chester

Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio denove invitas vin partopreni en ĝia Aŭtuna Federacia Kunveno, je sabato la 31a de oktobro en Hotelo Eaton, City Road, Chester, kvin minutojn piede de la stacidomo.

Bonvolu alveni post la 11a horo matene, ĉe la Bar-salono, maldekstre post eniri la hotelon. Tie eblos aĉeti loteri-biletojn kaj brokantajn librojn profite al la federacia kaso. Oni servos per plena bufeda lunĉo, kun pladoj por veganoj kaj vegetaranoj, je 12h30.

Post la lunĉo okazos mallonga komitatkunsido. Poste nia ĉi-jara gastparolanto, memore al Antonia Rostron Van Ess, estos Harry Barron, specialisto pri alternativa medicino. Post la parolado estos paŭzo por teo aŭ kafo, loterio kaj babilado en Esperanto. Fino antaŭ la 6a horo. La inkluziva kotizo estas £11. Bonvolu sendi vian ĉekon al: I.A. Mac Dowall, 40 Danehurst Road, Wallasey CH45 3JJ, kiel eble plej rapide kaj plej laste je la 28a de oktobro.

La hotelo nun havas teretaĝajn lifton kaj necesejojn.

Ian Mac Dowall (retpoŝte: EsperantoCH45@aol.com. Tel. (0151) 638 6802).



ESPÉRANTO-NORD
Fédération d'espéranto. Nord-Pas-de-Calais & Picardie

Rendevuo en Morbecque, Norda Francio

Ĉi-jare la 21a Eŭropa Rendevuo en Morbecque-le-Parc, Norda Francio, okazos dum la 14a kaj 15a de novembro. Aliĝo alvenu antaŭ la 10a de novembro al s-ino France Valet, 274 rue du Boulenriez, FR-59235 Bersèe. Tel. 00 33 (0)3 20 84 96 09; rete: morbecque@esperanto-nord.org; retpaĝaro: www.esperanto-nord.org.



A picture taken at the latest meeting of the South Lancashire Esperanto Group on 5 September in Southport.

Cardiff Esperanto Society now reactivated

The Cardiff Esperanto Society, particularly active during the 1970s and early '80s, has had a new breath of life. After a number of years when the society was able to meet only intermittently when visitors and guest students were in the city, there is now a small but solid core of members.

The Cardiff Esperantists are aiming to meet monthly, usually in the city centre, and welcome any visitors to South Wales to get in touch and come along. A website is under preparation, but anyone interested may contact Heather Eason at <esperanto.cardiff@googlemail.com>.

Charity run

Rob Hawkins of the Cardiff Esperanto Society will be running the Cardiff Half-Marathon on 18 October 2009 to raise money for the cancer charity CLIC Sargent. To donate or send messages of support, in Esperanto or English, please see his fundraising website at www.justgiving.com/Robin-Hawkins.

ANONCETOJ

Deziras korespondi. Ĉu iu el Britio aŭ Eŭropo interesiĝas korespondi kun 34-jara brita malliberulo por helpi min plue lerni. Nova al la lingvo ekde aprilo 2009. Lerni sola en malliberejo estas malfacile. Amikinoj plej bonvenaj! S-ro Ciarán Collins (JN1057), HMP Guys Marsh, Shaftesbury, Dorset, SP7 0AH.

Translation request. Arthur V. Coyne has written a short play 'A Dialogue of Common Expressions'. He would like to have it translated into Esperanto, for which he is willing to compensate. Part has already been translated. Contact Arthur V. Coyne, 112 Dedworth Road, Windsor, Berkshire, SL4 5BD. Tel. 01753 851351.

THE BUCHANAN LECTURE 2009

**Professor Wim
Jansen, University
of Amsterdam**

“Our Language”

**Why language-
users identify
with a language:
the case of Esperanto**

5.00 pm, Thursday 19 November 2009 in the
University of Liverpool



Admission by invitation (precise location TBA)

If interested, please contact Viv O'Dunne at Esperanto House. Tel. 0845 230 1887



Nova glumarko feste por la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof

New sticker celebrating the 150th anniversary of the birth of Zamenhof

• £1.80 per sheet of 20 + 30p. postage for one or two sheets, or 50p. postage for three or more sheets. Order from EAB, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.

Por honori la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de prof. d-ro Ivo Lapenna (1909–87), prof. John Wells prezentos liajn vivon kaj laboron ĉe la Londona Esperanto-Klubo vespere de la 23a de oktobro.



Foto: Torben Kohler, 2009

• **Londona Esperanto-Klubo**, c/o London Irish Centre, 50–52 Camden Square, NW1 9XB. Tel. 020-7916 7272. *Metrostacio*: Camden Town. *Fervojo*: Camden Road. *Busoj*: 29, 253, 274, 31. *Retejo*: www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek. *Alveno* ekde 18h00–19h00. Antaŭ la ĉefprogramero (19h15–20h15) kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaŝtrinki kaj babili. Fino 22h00.

Listo de brokantaj libroj

Prezoj inkluzivas sendokostojn. SB = broŝurita, HB = bindita

Batalo de l'vivo, La Charles Dickens, tradukis el la germana L.L. Zamenhof. 3a eld., Fed. de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdamo. HB, 128p. £1.80

Ĉielarko Julio Baghy. Poemoj originale verkitaj en Esperanto. Stafeto, Tenerife, 1966. SB, 111p. £1.15

Ĉiu ĉiun Teo Jung. Memoraĵoj de 86-jara optimisto pri sep jardekoj en la Esperanto-movado. Bona stato. Stafeto, La Laguna. 1979, SB, 398p. £2.50

Kruko kaj baniko el Bervalo Louis Beaucaire. Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj. Heroldo, Kopenhago, 1970, SB, 143p. £2.00

Marta Eliza Orzeszkowa. Tradukis L.L. Zamenhof el la pola. Francio, 1968, HB, 213p. £1.25

Novaj Esperanto-historietoj de diversaj aŭtoroj Dansk Eo-Forlag, Danlando, 1956. SB, 70p. £1.25

Parnasa gvidlibro K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard. Kun analizo de metriko, valoraj konsiloj por poetoj kaj rimvortaro kun glosaro. 3a eld., Edistudio, Pisa/Madrigo, 1984, SB, 208p. £3.70

Reĝo Lear Shakespeare. Tradukis K. Kalocsay. UEA, Roterdamo, 1966, HB, 156p. £2.00

Somermeznokta sonĝo Shakespeare. Tradukis K. Kalocsay. Stafeto. La Laguna, 1967, SB, 99p. £1.25

Tempesto, La Shakespeare. Tradukis K. Kalocsay. Stafeto. La Laguna, 1970, SB, 119p. £1.25